

2/2004

-kune-



reich werden mit Esperanto

26. Jahrgang, ISSN 0942-0576 und 11405

Die /kune./ ist die Verbandszeitschrift der Deutschen Esperanto-Jugend e.V. und erscheint viermal jährlich. Ein Jahresabo kostet 15 Euro (Bestellung durch Überweisung auf das Beitragskonto der DEJ). Für Mitglieder der DEJ ist der Bezugspreis im Mitgliedsbeitrag enthalten. Erscheinungsweise: dreimonatlich, Anzeigenpreise auf Anfrage, Druckauflage: 1000 Stück, Druckerei: Kirchhoff Druck-Anröchte
Titel: Nastia Kojevnikova

Vivteni sin per Esperanto	04-06
Esperantujo plu kreskas	07-09
letero el Esperantujo	09-12

vorwort

Saluton!

Finfine pli-malpli someras. Sed malgraŭ la alproksimiĝantaj ferioj ni laboras kaj pretigis tiun-ĉi novan eldonon de /kune/ - dankon al ĉiuj kiuj kunlaboris! Esperante ke la rezulto estiĝis interesa mi deziras al vi bonan legadon/someron!

Via

-esceptokaze, ĉar Stefa en Rusio nun estas-

Katharina Tanzberger



eniro al manĝejo en universitato en vieno

inhalt

03

aŭstria papilio	13-15
Tanzanio	16-21
demandoj al filozofo	22-23
adreso	24-25

La demando estas ne tute facila kaj revenas de tempo al tempo: Ĉu oni rajtas enspezi monon pro taskoj en Esperantujo?

cioj de Esperantujo - estas eldonistoj kaj librovendistoj, organizantoj kaj kunlaborantoj de kelkaj Esperanto-renkontiĝoj kaj de kulturcentroj.

Instrui senpage - kiom longe?

La fakto, ke kelkaj homoj ri-

oni plejofte ne povas eviti, ke tiu homo ricevu honoraron simile kiel ĉe aliaj lingvoj.

Tuttaga laboro

Krome estas kelkaj laboroj, kiuj bezonas plentempan agadon - ne havus sencon, ke la direktoro de UEA dediĉus nur kelkajn

pektivo, necesas havi solidan finanĉan bazon. Ni nun kreas plurajn ne-enspezigajn servojn kiel niajn retajn novaĵojn ĉe esperantoland.org, la informojn pri Esperanto-grupoj kaj -renkontiĝoj, la plusendoadresojn aŭ nian kelkfojan gazetaran laboron; krome ni ofertas du

Vivteni sin per


Esperanto

05

Oficistoj de Esperanto-asocioj

En la hodiaŭa Esperantujo troviĝas pluraj homoj, kiuj enspezas monon pro sia laboro. La dungitoj de UEA kaj de FEL ricevas salajron kaj same kelkaj aliaj tuttempaj au partatempaj dungitoj de aliaj Esperanto-asocioj. Antaŭ la falo de la muro estis eĉ pli multaj, ĉar en orienta Eŭropo la ŝtatoj financis plurajn Esperanto-asociojn.

Krome estas kelkaj homoj, kiuj laboras en kulturaj institucioj.



cevas salajron aŭ honoraron por sia laboro kaj aliaj laboras honorofice, ne estas tute facile digestebla. Laŭ mi la prijuĝo dependas de la speco de laboro kaj de la vivsituacio de la koncerna homo.

Estas kelkaj laboroj, por kiuj ne eblas trovi homojn, kiuj daŭre kaj fide laboras altkvalite sen ricevi salajron - multaj administraj taskoj perdas sian allogon post kelka tempo. Mi konstatis ankaŭ, ke multaj homoj ŝatas senpage instrui dum iom da tempo, eble dum kvin aŭ dek kursoj - sed iam tio fariĝas rutina tasko kaj oni preferas grandigi sian scion kaj sperton en alia tereno. Tiam, se la homo ne estas pagata, Esperantujo perdas instruanton en la momento, en kiu li aŭ ŝi ĵus komencas esti bona. Se en Esperantujo oni deziras havi spertan homon, kiu profesinivele instruas Esperanton,

horojn semajne al la gvidado de pluraj dungitoj. Por multaj taskoj oni bezonas homon, kiu akceptas informojn dum la tuta tago kaj kiu ankaŭ daŭre ĉeestas. Dum ju pli multe da horoj homo laboras ĉiusemajne por Esperanto kaj dum ju pli multaj jaroj li aŭ ŝi tion faras, des pli bona estas principe ŝia aŭ lia kvalifiko por tiu laboro - nu, eble post kelkaj jaroj iom da ŝanĝo ne malutilas. Se ni en Esperantujo deziras esti profesinivelajn servojn kaj produktojn, akurate pretigitajn kaj altkvalitajn, ni ne povas apogini sur nur honorofica laboro.

EsperantoLand - por kreskigi Esperantujojn

Kiam kun Sebastian Hartwig mi fondis la projekton „EsperantoLand“ meze de 2001, ni dekomence celis altan kvaliton de la laboro kaj decidis, ke por povi liveri tion kun longa pers-

internaciajn renkontiĝojn kun lingvokursoj - SOMERE kaj Novjara Renkontiĝo - kaj daŭrigas la libroservon de la Esperanto-Centro (iam Paderborn). La aktualaj enspezoj laŭhore estas malaltaj pro la multaj senkostaj servoj - certe la longavida stabileco de la nuna asocio „EsperantoLand“, la kvalito de ĝiaj servoj kaj ĝia kontribuo al la progreso de Esperanto dependos de ĝia estonta kapablo nutri almenaŭ parte kelkajn el la kunlaborantoj.

Homo bezonas enspezojn

Revenante al la ĝenerala temo: Rolon rilate al la pagado de Esperanto-laboroj ludas ankaŭ la vivsituacio de la koncerna homo. Se la laboranto havas kutime pagatan daŭran laboron, pension aŭ alian regulan monfonton, tiam eblas labori honorofice. Studentoj krome

kutimas entuziasme engaĝiĝi en diversaj projektoj, interalie rilate Esperanton, kaj dume neglekti, ke ilia tempo principe devus iri al la studado. Tiu vivofazo havas sian naturan limon - kaj tiam la homo foriras el sia posteno por gajni sian vivon eksteresperantuje ĝuste

ron. Se oni ofertas sian servon je honorario, kiu estas eĉ malalta ekster Esperantujo, oni tamen devas atendi nekompenemon ĉe multaj Esperanto-parolantoj - ili preferus, ke oni laborus senpage. Tre bela afero - sed la kvanto da horoj, dum kiuj oni povas labori kon-

ESPERANTUJO

La 3a

Novjara Renkontiĝo

okazos en la kastelo „Marienburg“ super Mozelo Intertempe en Germanio ekzistas jam tri unusemajnaj

tis ludvespero, silvestra festo kun bone prizorgita diskoteko kaj multspeca adiaŭa vespero. Oni povis dumtage partopreni en dancateliero, praktiki Qigong, korse kanti, ludi briĝon kaj lerni Yumeiho-terapion kaj gimnastikon. Krome estis pluraj prelegoj, ekzemple pri Novosi-

Vivteni sin.

Esperantujo...

07

en tiu momento, en kiu li aŭ ŝi estas plej bone kvalifikita por la Esperanto-laboroj. Sekvas ofte novulo, kiu komencas lerni pri sia tasko; tio ne levas la ĝeneralan nivelon de niaj produktoj kaj servoj kaj sekve ĝenas la progreson de Esperantujo. (Aliflanke kompreneble tiu lernado ja estas tre bona por la koncerno - sed eble iom pli da ekvilibro inter ĝuo kaj kvalito utilis.)

traŭ malalta aŭ neniu honorario, estas ĝenerale limigita, en unuopa monato kaj en la vivo entute. (Aldoniĝas, ke la grava diferenco inter honorario kaj laŭhora salajro estas ne tre konata - honorario devas ofte esti minimume duoble pli alta.)

Pagata laboro - kaj honorofica!

Se Esperantujo volas daŭrigi sian kreskadon, kiu komencis rapidiĝi antaŭ trideko da jaroj, ĝi bezonas altkvalitan laboron - kaj por tio ne eviteblas permesi al kelkaj homoj, ke ili vivtenu sin parte aŭ tute per Esperanto-laboroj. Sed sen ajna dubo la honorofica laboro estas multrilate tre bela kaj plaĉa afero por la tuta etoso - kaj certe pluekzistu en multaj kampoj.

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand

Senkostaj ofertoj kaj malaltaj honorarioj

Kelkaj homoj provas parte aŭ entute vivi per laboroj en Esperantujo. Pro pluraj kaŭzoj tio estas malfacila - unuflanke la merkato estas malgranda kaj sekve la raciigo havas siajn limojn. Krome la ofta ofertado de senkostaj aŭ malmultekostaj produktoj kaj servoj en Esperantujo malfaciligas ricevi normalajn enspezojn kaj salaj-

Esperanto-renkontiĝoj ĉirkaŭ silvestro - ni povas esti feliĉaj, ke Esperantujo pli kaj pli videble kreskas. En la plej nova, la „Novjara Renkontiĝo“ organizata de la asocio „EsperantoLand“, pasintan fojon kunvenis jam 60 homoj (en la antaŭa jaro estis 49). La kerna celgrupo estas la mezaĝuloj kun kaj sen infanoj - multaj el tiuj, kiuj dum la pasinta jardeko pli kaj pli apartenis al la pliaĝuloj en IS kaj ne plu emis iri tien. La Novjara Renkontiĝo estas malferma al ĉiuj aĝogrupoj - en la dua NR partoprenis kvar homoj inter 20 kaj 30 jaroj kaj eble kvin super 60 jaroj.

Skeĉoj de Lorient kaj ludvespero

La programo estas varia. Dum la pasinta dua NR en Tecklenburg estis muzikaj prezentoj de Ines kaj Christoph Frank kaj de Fabrice Morandea, es-

birsk, pri la verkoj de Beaucaire kaj pri la libro de Grey, laŭ kiu la „viroj venas de Marso kaj la virinoj de Venuso“. La traduka rondo ĉi-foje traktis skeĉojn de Lorient. Novjare ni promenis tra la kamparo kaj niaj ekskursoj iris al Münster kaj al agrikultura instalaĵo por „biogaso“. En la unuaj du tagoj krome okazis intensa kurso por komencantoj. Kaj certe la esenca parto estis la sama kiel en ĉiu Esperanto-renkontiĝo: amika babilado ĝis malfrua nokto.

Agrabla grandeco de Esperanto-renkontiĝoj

Antaŭ la unua Novjara Renkontiĝo mi longe pripensis kaj interparolis kun aliaj, ĉu vere al-



doni plian kunvenon. La ideon mi ja ekhavis antaŭ dek jaroj, kiam mi eksciis, ke laŭ la deziro de la IF-organizanto HDP tiu aranĝo prefere ne kresku super 200 partoprenantoj - supozeble saĝa decido, sed kien do iru la pliaj Esperanto-parolantoj super 25 aŭ 30 jaroj? Mi ne vo-

kontentigajn kontaktojn.

Alvenadas novuloj al Esperantujo

Inter la diversaj Esperantorenkontiĝoj okazas iomete da interŝanĝo; depende de la loko kaj kelkfoje de la temo, de la amikaro kaj de la aĝogrupo

per la rivero Mozelo, inter Koblenz kaj Trier. Detalojn trovu ĉe <http://www.EsperantoLand.org/nr>.

Lu Wunsch-Rolshoven,
EsperantoLand

...plu kreskas

lis forlogi partoprenantojn de la aliaj organizantoj, kiuj ja tre bone kaj multe laboras. Sed estas fakto nepretervidebla: La novjaraj renkontiĝoj en Germanio forte kreskis ĝis ĉirkaŭ la jaro 1990 kaj poste nur malrapide grandiĝis aŭ eĉ stagnis laŭnombro. Laŭ mi ili atingis sian superan limon de agrabla grandeco. Multaj homoj ne plu sentas sin hejme ekde certa kvanto da homoj kaj ili tiam ŝajne ne revenas. Granda renkontiĝo ja ofte signifas, ke la multjaraj partoprenantoj revidas sian grandan amikaron kaj sekve apenaŭ havas tempon por la novuloj. Tiuj

do kelkfoje havas malfacilaĵojn trovi

unuopaj homoj transiras al alia kunveno. La loko, kiuj tiel liberiĝas, kutime pleniĝas per novaj homoj, kiuj ja daŭre alfluas al Esperantujo; de la Internacia Seminario ekde jardekoj foriras la pliaĝuloj kaj novalvenas junuloj - kaj dume IS kreskadis! Laŭ mi bonaj Esperantorenkontiĝoj certe ne devas timi konkurencon de aliaj aranĝoj; ĉiu havas sian apartan karakteron kaj allogas pliajn homojn ĝis agrabla grandeco aŭ eble eĉ super ĝi. Kiam homoj el IS transiras ekzemple al NR, ekestas en IS loko por novaj junuloj, kiuj tie povas konatiĝi kun Esperantujo.

„Komune festi la novan jaron“

Mi ĝojos, se vi ŝatos konatiĝi kun tiu iom nova renkontiĝo, la tria Novjara Renkontiĝo, kiu okazos ĉi-jarfine en la kastelo „Marienburg“ bele situanta su-

letero el esperantujo

09

Karaj kun(e)homoj, nun venas la

Postrikolto al „Mr. Britling...“

Jam tradukante citaĵojn el Orsell, mi rimarkis, ke povas esti eĉ pli agrable traduki el la angla lingvo al Esperanto ol el la propra lingvo. La kaŭzo estas, ke ambaŭ lingvoj havas similan procentaĵon de la radikoj el latina/latinidaj lingvoj (ĉ. 80%), do la vortoj asociiĝas kvazaŭ aŭtomate, kaj la fleksebleco de Esperanto, kiu permesas tre nuancigajn kunmetaĵojn, sed laŭbezone ankaŭ povas imiti tiel nomatan izoligan lingvon, kiel la angla, tre faciligas la aferon. Oni nur devas atenti la „falsajn amikojn“, do vortojn, kiuj similas aŭ estas samradikaj, sed tamen havas malsaman signifon: Mr. Britling povas (angle) sidi ĉe sia „bureau“ (skribtablo), same la neder-

landanoj; germanoj povas nur sidi en sia „Büro“ (oficejo), kaj Esperantistoj entute ne povas sidi ĉe aŭ en ĝi, sed esti membro de ĝi („departemento aŭ instanco, kies membroj laboras kune, ordinaro en unu oficejo“ / „organo, kiu teknike direktas k. celas harmoniigi la laboron de kongreso, asembleo, konferenco ...“, PIV). Tiun



konstaton koncerne la tradukeblecon oni tamen ne povas inversigi, ĉar nun por homo, kiu ne parolas la anglan kiel gepatran lingvon, minacas la malreguleco de la angla lingvo kaj ĝia idiotismeco. (idiotismo: „nelogika [la vorton „logiko“ en tia kunteksto oni normale ans-

gramatiko estas aŭtentike transprenita, tamen kelkaj sendubaj preseraroj estas korektitaj ekz. Universalo Kongreso al Universala Kongreso.)

Trimil sepcent esperantistoj enskribiĝis por la Deko Universala Kongreso en Parizo 1914,

manio havis senperan limon al Ruslando], trovis ĝin fermita, reveturis Berlinon kaj devis entrepreni la longan vojaĝon tra Svedujo – Finnlando – Peterburgo por reatingi la hejmon en Varsovio. Sovaĝa kanonado kaj malamaj kantoj eksonis anstataŭ la espera himno. Diplo-

malamikaj landoj. Kompreneble ĉiu politika aŭ militista aludo estis severe malpermesita ... Sed Hodler faris pli. Per sia gazeto li memorigis la esperantistojn, ke ili estas homoj. „Ni havas la devon ne forgesi ..., ... ke neniu popolo havas la monopolon de la civilizacio, de

letero el

esperantujo

11

tataŭigu per „reguleco“) aparta vorto-[kaj fraz-]konstruo, propra al iu lingvo, sed ne al aliaj“, (PIV). Nu, mi promesis, ke mi volas citi samtempulon de la eventoj ĉirkaŭ la planita UK en Parizo 1914. Bonan atestanton mi trovis en Edmond Privat, kiu, kiel svivo, estas samtempe iom ekster la partioj, kiuj faris kaj suferis la militon, sed li ne estis ekster ĉiu koncerno, tute kontraŭe. Li ekzemple vizitis interalie la jam malsanan Zamenhof 1915 kaj 1916 en Varsovio. (La ortografio kaj

inter ili 2500 eksterlandanoj. Giganta palaco Gaumont estis luita kaj ornamita per verdaj flagoj. La salutparolo de sinjoro Painlevé estis preta. La organizo estis modele preparita.

Karavanoj de Rusoj, Germanoj, Angloj jam forvojaĝis, kiam eksplodis la eŭropa milito. Alveninte en Parizo la 1-an de Aŭgusto, la fremdaj esperantistoj vidis ekscititajn popolamasojn, generalan mobilizon, ŝirajn adiaŭojn de patrinoj kaj edzinoj al forirantaj viroj. La karavanoj reprenis mem la vagonarojn en granda urĝo. Sed ne ĉiuj povis. Kelkaj malfeliĉaj fremduloj estis internitaj en civilkaptitejoj. La ceteraj haltiĝis survoje aŭ revenis hejmen, multaj por forveturi siavice al batalkampoj. D-ro Zamenhof, haltigita en Köln, rapidis al rusa landlimo [Pollando tiam ŝtate ne ekzistis, ĝi estis dividita inter la rusa kaj la germana ŝtato, do Ger-

mataj intrigoj kaj imperialistaj ambicioj ĵetis tutan Eŭropon en aosan būadon. ...

Dum monatoj oni sciis nenion unu pri la aliaj. Tamen la flameto ne estingiĝis. En savita teranguleto, meze de l' ventego, la UEA-oficejo [tiam

la kulturo aŭ de la humaneco ... Devo kredi, ke neniu popolo entute havas la monopolon de la barbareco, perfideco aŭ stulteco ... Devo konservi prudenton eĉ meze de la premiĝaj influoj de la popolamasoj. ... Kiam centmiloj da homoj

agglutinierende Sprache: Das Esperanto wird gewöhnlich ... als „agglutinierende Sprache bezeichnet. Das bedeutet, dass ihre Bauelemente ... wie nach einem Baukastensystem, als Einheiten weiterhin erkennbar [radikoj, afiksoj ktp.], zusammengesetzt werden. Das Esperanto hat aber auch Merkmale einer isolierenden Sprache. Da fast alle Einheiten des Esperanto den Charakter von Wörtern haben, kann in der Anwendung der Mittel zwischen der Anlehnung an beide Typen gewählt werden. Willkommen (2001) p.XI

en Ĝenevo, fondita de Hector Hodler] restis malfermita en neŭtrala Svislando. Post ses monatoj da silento la gazeto „Esperanto“ reaperis en Januaro 1915. Hodler donis novaĵojn. Li estis organizinta servon por transsendado de familiaj korespondaĵoj inter

kuŝos en la bataltomboj kaj la ruinoj ĉe la venkintoj kaj venkintoj atestos pri la teknikaj pli ol pri la moralaj progresoj de nia civilizaco ...“

En kelkaj landoj, interalie en Germanio kaj Francio, aperis militaj propagandiloj en Esperanto pravigantaj la nacian

foto de Andreas Schlapsi



vidpunkton. Kelkfoje registara subteno, alifoje privataj iniciatoj tion subtenis. (el Privat, Historio II p. 93-95)

Jen la fino de Mr. Britling kaj la sekvoj. En la venonta letero mi donos du gravajn dokumentojn de Zamenhof mem, kiujn li

Maro kaj partoprenis la unuan Universalan Kongreson tie. Kiel juna homo li faris longajn propagandvojaĝojn tra Usono, Anglio, Francio, Ruslando kaj Mezeŭropo, kaj dum sia vivo li estis motoro de multaj aliaj gravaj iniciatoj interne kaj ekstere de Esperantio. Li verkis

el esperantujo

isolierende Sprache: Sprachtypus, in dem die strukturellen Elemente [gramatikaj eroj] als selbständige Einheiten [do: vortoj] getrennt auftreten. Die englische und die chinesische Sprache gelten als (weitgehend) isolierende Sprachen, ...“ Willkommen (2001) p. XIV. La germana lingvo markigas ekzemple la posedon per struktura elemento nevorta „-s“: Vaters Hut, Esperanto per prepozicio, do izola vorto: la ĉapelo de la patro.

skribis dum tiuj skuigaj eventoj, kaj la literaturliston. Edmond Privat:(1989-1962, *en Genevo), lingvisto, historiisto, prezidanto kaj honora prezidanto de UEA dum multaj jaroj, amiko de Mahatma Gandhi (libro: La vivo de Gandhi), estas unu el la gravegaj personoj de la Esperanto-movado. Li frue Esperantiĝis (1903), fondis kun alia grava sviso, Hector Hodler, junularan gazeton „Juna Esperantisto“ (1905). Piedire li atingis Bulonjon sur

lernilojn, kaj ekster la nomitajn historiajn verkojn li skribis inter alie „Vivo de Zamenhof“ kaj malgrandan tre bone legeblan kaj tre klerigan „La esprimo de sentoj en Esperanto“, aŭtobiografio (postmorte eldonita): „Aventuroj de pioniro“. Ĉiuj verkoj estas tre rekomendindaj ankaŭ pro lia ekzemplondona klara kaj eleganta stilo, karakterizitaj inter alie per la evito de pezaj pasivaj konstruoj kaj anstataŭe uzante aktivan.

Dirk Willkommen

Sinfonio „El Nova Eŭropo“

Sinfonio en sep movimentoj por granda orĥestro da ŝtatestroj, policistoj, civitanoj, doganistoj kaj Esperantistoj. Prezentejo estas Nova Gorica/Gorizia, mezgranda urbo dividita per la limo itala-slovena, ĉirkaŭ la 1 majo 2004 ejo de EU-plilarĝiĝo-festoj kaj Esperanto-seminarioj. Sen direktisto. Dediĉita al Antonín Dvořák [Dvoršák] (1841 – 1904), granda mondcivitano.

al aŭstria papilio

13

I. Introduzione: Lento – Ricapitulazione della introduzione: Molto lento – Ricapitulazione della Ricapitulazione: Lentissimo. [Lento: malrapida]

Al la Piazza Transalpina, kie estu limtransirejo, troviĝas tri-dekono da policistoj. Ne eblas trairi, pro preparlaboroj por la granda festo. Al la venonta limtransirejo eblas nek, ĉar malpermesita al mallokuloj. Post duonhora marŝado, la internacia limtransirejo. „Kion vi intencas fari en Slovenio“, demandas la policisto. Ĉu mi diru ke mi venas por plani tutmondan revolucion?

II. Andante religioso, quasi una elegia – Tempo di marcia

La Esperantistoj vicumas por atingi la ejon de la EU-festo.



Nomŝildoj faciligas la vivon (vidu mov. II)

Montriĝas ke ankaŭ en „Nova Eŭropo“ validas malnova leĝo: Aspekti gravule plifaciligas la vivon. Tiuj kiuj videble portas iliajn belajn nomŝildojn pli facile trairas diversajn kontrolojn. Intertempe alvenas la aŭtomobiloj de la graveguloj. La gravecon de la ulo montriĝas per la nombro de korpgardistoj (plej grava: la usona ambasadisto).

III. Rondo: Lento e molto cantabile. [Rondo: danca formo en kiu alterniĝas diversaj melodioj kun ripetoj de simpla temo].

Politikistaj paroladoj dum la granda festo. Kvankam pro lingvaj problemoj kompreneblas nek la slovenlingvaj nek la

la slovena, ĉar li „bezonas aŭtentikan slovenon“ kaj ties opinioj pri la okazaĵoj. La klopodoj konsoli lin per informoj pri Esperanto malsukcesas.

VI. Molto capricciosa

Je la 1a matene, la Esperantistoj ŝatus reiri al Slovenio. La

aŭstria papilio

itallingvaj paroladoj, la frekvenco de l'uzado de „Eŭropo“ kaj „historia“ ebligas diveni la bonkonatan enhavon. Aŭdeblas ke la artistoj emas aŭskulti sin mem.

IV. Prestissimo volanda.

Nokte de la 1a majo. Kvin esperantistoj ridetas al la limpolicistoj kiuj reridetas kaj ne kontrolas.

V. Intermezzo: misterioso

Ĵurnalisto de la aŭstria radio kaj televido aperas. Li malĝojas eltrovi ke la lingvo kiun parolas la Esperantistoj ne estas

limpolicistoj ne plu ridetas kaj volas rifuzi la transiron (ĉar la pasportoj estas ukrainaj kaj aŭstraj, kaj „ja ni estas en EU nun, sed ĉi-tie tamen estas limo“). Post kvin minuta ridetatako tamen eblas transpasi.

VII. Finale: alla internazionale

Post la fino de la seminario, la Esperantistoj reiras al la itala parto por atingi la stacidomon. Ĉelime, neniuj policistoj videblas ie ajn, malfermas la ŝranko. Facilas la vivo...

Gregor Hinker

Esperanto en la Uragano de Ideologioj

Internacia Esperanto-Simpozio en la Aŭstria Nacia Biblioteko

La 8-an kaj 9-an de oktobro 2004 la Aŭstria Nacia Biblioteko en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio organizos simpozion okaze de du Esperanto-jubileoj: la centa datreveno de la naskiĝo de Lidia Zamenhof (1904 – 1942) kaj la 75-jariĝo de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM, aligita al la Aŭstria Nacia

esperanto trovaĵo

15

Biblioteko en 1929). Prelegos Ulrich Lins (Germanio/Japanio, ĉefpreleganto), Vilmos Benczik (Hungario), Wera kaj Detlev Blanke (Germanio), Heiner Eichner (universitato de Vieno, Aŭstrio), Alex Kaefer (Aŭstrio), Herbert Mayer (IEM, Aŭstrio), Claude Piron (Svisio).

Partoprenkotizo: 50 €, por studentoj kaj lernantoj 35 €. Aliĝo: plansprachen@onb.ac.at

pli da informoj:

www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index/htm

Esperanto trovaĵo #4

trovita en „A-Bar“ en Jesenice, proksime al la stacidomo, 30 aprilo 2004.

Laŭ sekretaj informoj la stelo kaj la dorssako survojis al la seminario „Plilarĝiĝo de EU“ en Nova Gorica, Slovenio.



Se ankaŭ vi trovis Esperantaĵon kaj ŝatus ĝin kontribui, bv. ĝin sendi al kat.tanzberger@esperanto.at

En ĉi tiu artikolo mi unue prezentas la landon Tanzanio, kaj poste skribas pri miaj personaj spertoj tie.

Inter mia lerneja kaj universitata studado mi estis dum ok kaj duona monatoj en Tanzanio, por fari volontan laboron

nio pli ol cent lingvoj, el kiuj la plejmulto ankoraŭ estas uzataj, ĉefe en vilaĝoj, ĉar en la urboj la svahila estas la plej grava lingvo.

Kiam la eŭropaj landoj dividis la afrikan kontinenton inter si, la regiono kiu nun estas Tan-

li volis igi ĉi-lastan la nacia lingvo. Tio jam estis granda paŝo komparata kun aliaj afrikaj landoj, kiuj grandparte ankoraŭ nur uzas la koloniajn lingvojn por instruado, sed ĝi ne estis kompleta paŝo: Pro la tiama manko de lernlibroj en la svahila, la lingvo de instruado

tuta edukado, tiuj kiuj volas ke nur la angla estu uzata, kaj tiuj kiuj volas ke la nuna sistemo de lingvoŝanĝo post la elementa lernejo pludaŭru, kun malgrandaj ŝanĝoj por iel plibonigi la sistemon.

La socio de Tanzanio ege in-

Tanzanio

tie. **Pli pri tio poste, unue mi prezentu la landon mem:**

Tanzanio estas lando en orientafriko ĉe la marbordo, inter Kenjo kaj Mozambiko. Ĝi estiĝis post unuiĝo de la lando Tanganjiko kun la insularo Zanzibaro. Ĝia loĝantaro estas 35 milionoj, kaj ĝia areo preskaŭ trioble tiu de Germanio.

La lingvo de Zanzibaro kaj apudaj marbordoj, nomita la svahila, jam estis grava lingvo en tiu regiono dum longa tempo. Oni skribis ĝin per araba alfabeto, pro la araba kaj islama influo tiutempe. Nur post la koloniigo fare de la eŭropanoj, oni komencis uzi la latinan alfabeton, kiu taŭgas multe pli por la svahila lingvo pro ĝia vokalriĉeco. Krom la svahila estis parolataj en la areo de la nuna Tanza-

nia aparteniĝis al Germanio. Pro tio ankoraŭ troviĝas kelkaj germanaj vortoj en la svahila, kiel ekzemple "shule". Post la unua mondmilito, ĝi iĝis brita protektorato, kaj la angla lingvo iĝis pli grava. La apuda lando Kenjo, kie ankaŭ parolas la svahila, jam estis brita kolonio dekomence, kaj pro tio la angla lingvo jam estis multe pli grava tie.

Post la sendependiĝo de Tanganjiko, estis elektita kiel unua prezidento Nyerere, kiu jam montriĝis socialisto dum la batalo por la sendependiĝo. Li multe ŝanĝis la ekonomian, politikan kaj kulturalan situacion, por iĝi la landon pli socialista. Ankaŭ estis li kiu unuigis Tanganjikon kun Zanzibaro, per kio estiĝis Tanzanio. Li ankaŭ ŝanĝis la lingvon de instruado en elementa lernejo de la angla al la svahila, ĉar

en gimnazioj kaj universitatoj restis la angla.

Pro tio estiĝis la nuna lingva situacio en Tanzanio: Preskaŭ ĉiu scipovas la svahilan flue (krom kelkaj maljunuloj aŭ loĝantoj de tre foraj vilaĝoj), kaj ĝi ankaŭ estas la oficiala lingvo en politiko ktp, sed la angla ankoraŭ estas konsiderata signo de edukeco, ĉar oni ja devas scipovi ĝin por ricevi pli altan edukon.

Nur dek elcentoj de la infanoj finintaj la elementan lernejon daŭrigas la lernadon en gimnazio, ĉefe pro la lingva problemo. Kaj nur unu elcento finas la gimnazion, ankaŭ pro la lingva problemo. Pro tio jam okazis multegaj politikaj diskutoj pri ebla ŝanĝo de la eduka sistemo, sed ĝis nun nenio okazis. En tiuj diskutoj estas tri partioj: Tiuj kiuj volas ke la svahila iĝu lingvo de la

Tanzanio

17



Tajlorinoj en la urbo Iringa.

fluiĝis de la socialistaj ideoj de Nyerere. Kvankam la postaj prezidentoj tute ne plu estis socialistaj, ankoraŭ ekzistas tiu socialista sento, komparata kun la najbarlando Kenjo, kie mi ankaŭ estis dufoje. Kiel en la tuta Afriko, la malsamecoj inter urbanoj kaj vilaĝanoj estas grandegaj sur ĉiuj kampoj: Eduko, politiko, ekonomia situacio ktp. Unu el la ĉefaj problemoj en

Tanzanio nuntempe estas la malsano aidoso (germane AIDS). Jam 13% de la loĝantaro havas la viruson HIV, kiu kaŭzas tiun malsanon. Multaj infanoj perdis iliajn gepatrojn, kaj multaj aliaj sociaj problemoj estiĝis aŭ akriĝis pro tiu malsano.

gejunulojn el Anglio kaj aliaj evoluintaj landoj al evolulandoj en Afriko kaj Azio por partopreni en la evoluhelpo. Tie oni laboras en partnereco kun loka volontulo, kio ege plibonigas ilian laboron. Ili havas diversajn projektojn por kiuj oni povas labori, kaj mi elektis

antaŭ ol fine komenci nian laboron.

La volontuloj el evoluintaj landoj devis alveni du tagojn antaŭ la tanzaniaj volontuloj por iomete lerni la svahilan. Tamen tio ne multe helpis, kaj nur tiuj, kiuj kunportis lerno-

nekonatajn homojn surstrate, kaj kelkfoje komencas konversacion kun ili.

Nia laboro en la vilaĝo konsistis el kvar ĉefaj partoj:

1. Instruado en la gimnazio pri aidoso kaj rilataj temoj,

Tanzanio

Tanzanio

19



Infanoj en tanzania vilaĝo.

Nun mi skribos pri miaj personaj spertoj dum mia ok-kaj-duon-monata restado en Tanzanio:

Mi iris al Tanzanio per karitata organizo el Anglio, nomata SPW. Tiu signifas Students' Partnership Worldwide, do Studenta Partnereco Tutmonda. Tiu organizo sendas

instrui en gimnazio, ĉefe pri aidoso.

Mi elektis la projekton en Tanzanio, ĉar mi aŭdis ke nur tie oni vere devas lerni la lokan lingvon. En la projektoj de la aliaj landoj oni povas uzi la anglan, ĉar la organizo nur laboras en iamaj britaj kolonioj.

Kiam mi alvenis en Tanzanio, mi unue estis trejnita de la organizo por plenumi mian laboron. Tio okazis en la urbo Iringa, ĉefurbo de la regiono Iringa, kie la organizo laboras. Mi estis trejnita kune kun ĉiuj aliaj volontuloj, tiuj de la evoluintaj landoj kaj tiuj de Tanzanio.

Post dusemajna trejnado en la urbo ni iris dum du semajnoj al niaj vilaĝoj kun niaj partneroj por ekkoni la ĉirkaŭaĵon, kaj poste havis plurajn du semajnojn da trejnado en la urbo

libron kaj mem penis lerni la lingvon, sukcesis bone paroli ĝin.

Jam dum la trejnado mi estis iomete ŝokita kiom malsama fremda kulturo povas esti. Mi ja jam konis kulturajn malsamecojn inter kelkaj landoj kiel Germanio, Argentino kaj Anglio. Pro tio mi pensis ke ekkoni alian kulturon estus tre facila por mi. Tamen la kulturoj, kiujn mi jam konis, ĉiuj estas okcidentaj kulturoj, kaj pro tio similas unu al la alia. La kulturo en Tanzanio estas tre malsama al tiuj, kaj la kultura diverseco ene de la lando jam estas komparebla kun tiu de la tuta Eŭropo, pro la multaj malsamaj etnoj tie vivantaj. La malsamaj kulturoj estas ekzemple ke ili ŝatas dormi kun lumo kaj laŭta radio, ke ili multe tuŝas unu la alian ekzemple prenante la manon de amiko kaj ke ili salutas

ekz. plenkreskado, seksa edukado, uzo de drogoj ktp. Tiu estis nia ĉefa laboro.

2. Instruado de normalaj studfakoj, en mia kazo matematiko.

3. Organizado de eventoj kun eduka celo en la gimnazio, en apudaj vilaĝoj kaj en apudaj elementaj lernejoj. Tiuj eventoj konsistis el teatraj kaj oraj prezentoj, piedpilkado kaj aliaj amuzaĵoj, kaj ili estis tre gravaj, ĉar nur tiel ni povis allogi grandajn homkvantojn por transdoni al ili mesaĝon pri aidoso.

4. Organizado de seminarioj en apudaj vilaĝoj, kie ni ankaŭ informis pri aidoso kaj rilataj temoj.

Dum mia tempo en la vilaĝo mi ofte pensis ke mi ne kaŭzis tiom grandan plibonigon kiel

mi antaŭe estis esperinta. Sed je la fino de la tempo mi vidis ke mia laboro estis nur unu parto de longa ĉeno, ĉar jam antaŭ mi la organizo komencis ilian laboron, kaj ili ankoraŭ longe pludaŭrigos ĝin. Dum mia tempo tie mi nur iomete kreskigis la scion

nero. Nia lernejo havis generatoron kiu alportis elektrikon por lumo al nia domo dum du kaj duona horo vespere, sed eĉ tio ofte tute ne funkciis. Normale ni havis fluantan akvon ĉe unu akvokrano, sed ofte ĝi ne funkciis, kaj pro tio ni ĉiam devis havi plenan

mia frato kaj unu filo de li ne sukcesis pro altituda malsano, sed ni aliaj sukcesis grimpi ĝin ĝis la pinto, kio estis tre bela sperto, kvankam tre malfacila.

Je la fino de mia tempo en Tanzanio mi jam tre bone regis la svahilan, kiel nur du aliaj

Volontuloj de SPW en Iringa.



Tanzanio

Tanzanio

21

kaj komprenon pri aidoso ĉe la lernantoj kaj loĝantoj en la vilaĝo, sed tio estis grava parto en la longdaŭra labro de la organizaĵo.

Mi vivis en unuĉambra dometo kune kun mia tanzania part-

sitelon da akvo. Ĉio ĉi igis la vivon tie malfacila, sed post iom da tempo oni al kutimiĝas, kaj kiam oni revenas, oni miras pri ĉiuj teknikaĵoj kiujn ni havas ĉi tie.

Dum miaj paskaj ferioj mi trajne vojaĝis al la nordo de Tanzanio por tie viziti gastiganton de Pasporta servo. Tio estis mia ununura parola uzo de Esperanto tie. Krom tio mi multe uzis ĝin interrete ĉiufoje kiam mi estis en iu urbo.

Dum la someraj ferioj mi unue vojaĝis tra la sudo de Tanzanio, kaj poste renkontiĝis kun mia patro, kun amiko de li, kaj liaj du filoj, kiuj venis el Hamburgo por viziti min kaj grimpi la Kilimanĝaron kun mi. Tiu estas la plej alta monto en Afriko, sed pli facile grimpebla ol multaj aliaj montoj, ĉar ĝi ne estas tiom kruta. La amiko de

de la dek naŭ blankaj volontuloj de nia organizaĵo. Mi nur sukcesis kun tio pro komenca lernado de la gramatiko kaj posta praktiko per legado, per kiu mi lernis multajn vortojn. Bedaŭrinde mi jam forgesis

ĝin iomete, sed mi provas ne tute forgesi ĝin per legado de libroj kiujn mi kunportis kaj per korespondado kun la amikoj kiujn mi faris tie.

Marcos Cramer

somero, jen ni!



foto de Andreas Schlapsi



Mi kaj miaj kungrimantoj sur Kilimanĝaro.

Saluton Amando !

Hallo Amando !

Ĉe junularaj renkontiĝoj C-landoj ricevas la plej grandan rabaton kaj A-landoj devas pagi la plej altajn kotizojn. Mi opinias ke estas

Kara Marie,

Liebe Marie,

sendube, tiel agi estas malhoneste, senkonscience kaj ne laste damaĝe ĝenerale por socia sinteno. La concerna partoprenanto simple ignoras elprovitajn

subtena mono por orienta Germanio staras same sur de la deputitosalarioj en la Eŭropa Parlamento. Ne kritikis vane la germana prezidanto en lia parolo la

boato. Ni devos obeigi nian egoismon, individue kaj en la grupo, se ni volas travivi. Estas agrable konstati, ke ĝuste en tiu kritika tempo ĉiam pli kreskas la respondecu al la tuto, al io kio ĉe

demandoj al

filozofa

23

maljuste, se partoprenantoj aliĝas kiel C-landanoj, ĉar ili devone estas el malriĉa lando, kvankam ili jam delonge loĝas en A-lando. Ĉu ne detruas la sistemon de subteno de kotizoj por malriĉaj landoj, se ili aliĝas en la malĝusta kategorio?

Marie K. el Soest

Marie K. aus Soest

moralajn konvenciojn, kiuj principe konstruas la sistemon de civilizaj socioj. Kiel la fortuloj ne lasas simple fali la malfortulojn. Des pli malbone, se la malforteco estas nur ŝajnigita. Tiam malaperas ĉiu konfideco kaj la malfortuloj devas ankoraŭ multe pli suferi. Estas escepte malbone, se tio okazas en iu societo, kiu eksterordinare atentis pri humaneco kaj kritikis la maljustecon en la mondo. Sed la temo estas bedaurinde, ĝenerale en la mondo tre aktuala. Skandaleca memriĉigo el la

malkonvenaĵojn, alvokinte al moderiĝo, decu kaj komuna saĝo. Principe estas la sama moralo, se iu aliĝas al C-landoj kvankam li/ŝi apartenas al A-landoj. Do, unuflanke: Ni ne prenu la aferon tro tragike, post kiam bedaŭrinde en nia nuna mondo tiuj malkonvenaĵoj fariĝis preskaŭ ĉiutagaj. Junaj homoj ofte opinias ke ili estas eksterordinare laŭtempaj, se ili tiel agas kiel la tiel nomataj elituloj. Aliflanke: Nenio alio restas al ni en la estonteco ol la riprenado, ke ni ĉiuj sidas en la sama

la esperantomovado havas jam longan tradicion. Pro tio devas ĝuste la junaj homoj, kiuj sin movas ĉirkaŭ Esperanto, esti eksterordinare atentemaj ke tiaj derektiĝoj ne povu ofte okazi. Kun amikaj salutoj Amando M. la Esperantobewegung schon eine lange Tradition hat. Deshalb müssen gerade junge Leute, in Esperantujo besonders achtsam sein, dass ähnliche Entgleisungen nur selten passieren. Mit freundlichen Grüßen Amando M.

Bundesgeschäftsstelle (BerO)

Einbecker Str. 36, 10317 Berlin, Tel./
Fax.: (0 30) 42 85 78 99,
E-Mail: bero@esperanto.de,
weitere Infos unter:
<http://www.esperanto.de/dej/bero.htm>

DEJ-Mitgliederverwaltung

Sabina Nedl, Rushaimerstr. 10, 80689
München
E-Mail: gej.ma@esperanto.de

Internationale Beziehungen

Anna-Laura Wickström,
c/o Deutsche Esperanto-Jugend, Ein-
becker Straße 36, 10317 Berlin,
E-Mail: gej.kir@esperanto.de

kune

Deutsche Esperanto
Jugend, Einbecker Str. 36,
10317 Berlin
E-mail: kune@esperanto.de

DEJ-Mitgliedsbeiträge 2004

Bitte beachtet: Alle Beiträge sind zum
Jahresbeginn bzw. zum Beitrittszeit-
punkt auf das angegebene Konto
zu überweisen. Zuschriften, die die
Mitgliedschaft betreffen (Adress-ände-
rungen u. ä.), bitte direkt an das BerO
(Adresse siehe oben).

Kategorie A (Jahrgang 1978-87):

• Schüler, Studenten, Azubis, Zivil-

Eine tolle Möglichkeit, unauffällig auf
Esperanto aufmerksam zu machen.

Infos bei:
Steffen.Pietsch@esperanto.de

Spenden

(genauso wie die Mitgliedsbeiträge)
an die DEJ sind steuerlich abzugs-
fähig. Die Bankverbindung findest du
oben.

adressen

dej-intern

25

Vorsitz

Felix Zesch, Adenauerring 2//B8,
76131 Karlsruhe, Tel.: (01 79) 7 50
00 53,
E-Mail: gej.prezidanto@esperanto.de

Unterorganisationen

Julia Noe, Katharinenstr. 4, 69-321,
70182 Stuttgart,
Tel.: (07 11) 6 20 91 21,
E-Mail: gej.kola@esperanto.de

Veranstaltungen

Martin Sawitzki, Max-Planck-Ring 8d,
Wg. 56, 98693 Ilmenau
Tel.: (0 36 77) 4 44 50 5,
E-Mail: gej.kkren@esperanto.de

Finanzen

Anna Posingies, Danziger Str. 68,
10435 Berlin,
E-Mail: gej.kasko@esperanto.de

Subventionen

Andreas Diemel, Buderusstr. 3, 4507
Essen, Tel.: (0201) 4787202, E-Mail:
gej.supu@esperanto.de

Öffentlichkeitsarbeit

Isabel Frey, Kellerweg 59, 67583 Gun-
tersblum, E-Mail: gej.kapri@yahoo.de

Briefkontakte

Luisa Rund, Herbert-Baum-Str.
11, 13088 Berlin, Tel.: (0 30) 96
20 51 24, E-Mail: [koresponda.
servo@esperanto.de](mailto:koresponda.servo@esperanto.de)

Deutscher Esperanto-Bund

(DEB), Immentalstr. 3, 79104 Frei-
burg, Tel.: (07 61) 28 92 99,
Fax: (07 61) 28 92 96,
E-Mail: GEA@esperanto.de

Bücherdienst des DEB,

Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-
Seeger-Str.
9, 55129 Mainz, Tel./Fax: (0 61 36)
4 62 32 (abends), E-Mail: [wolfgang.
schwanzer@esperanto.de](mailto:wolfgang.schwanzer@esperanto.de)

Deutsche Esperanto-Bibliothek

Torhaus, Gmünder Torplatz, 73430
Aalen, Tel. (0 73 61) 52 - 25 85 od.
52 - 25 80

junularo esperanta svislanda

Postfach 3324, CH-4002 Basel,
Schweiz, E-Mail: jes@skol.ch

Österreichische

Esperanto-Jugend

Postfach 804, A-8011 Graz
E-Mail: aej@esperanto.at
<http://aej.esperanto.at/>

oder Wehrdienstleistende, Arbeitslose
15 Euro

• Jugendliche mit Einkommen 30E

Kategorie B (ab 1988): 8 E

Förderer

(freiwilliger Beitrag, jeweils mind.)
ohne Einkommen 15 Euro
mit Einkommen 30 Euro

P-Förderer

freiwilliger Beitrag mind. 50 Euro

Bankverbindung

Bank für Sozialwirtschaft Hannover
(BLZ 251 205 10), Kto.-Nr.: 8424901
(Beiträge, Spenden, Abos) oder
8424900 (für Treffen)

Internet

www.esperanto.de/dej. Hier ist die
DEJ mit ihren Internet-Seiten präsent.
Hier sind aktuelle Infos und viele
Hintergrundnachrichten über unsere
Arbeit und andere Esperanto-
Aktivitäten leicht zugänglich.
Wir bieten auch eine
Esperanto-E-Mail-Adresse (z.B. in der
Form [Gabi.Mustermann@esperanto.
de](mailto:Gabi.Mustermann@esperanto.de)) für nur 3 E. pro Jahr an. Auf diese
Eo-Adresse eingehende Nachrichten
werden an deine Haupt-E-Mail-
Adresse automatisch weitergeleitet.

Mitgliederwerbepremien, Habt

ihr schon mal gemerkt, dass euer
Geldbeutel genauso leer ist
wie die Mitgliederliste? Also wollen
wir beides füllen. Für jedes C-Mit-
glied, das ihr bis Ende 2004 werbt,
bekommt ihr 0,50 E, für jedes A-, B-,
F- und P-Mitglied (auch weiterhin)
bekommt ihr euren kompletten
Jahresbeitrag erstattet.

Grüner Draht (Verda Lineo)

Hast du den Akkusativ vergessen?
Was heißt „Esperanto“ eigentlich auf
Deutsch?
Ein DEJ-Service: Der Grüne Draht
(Verda Lineo) unter
Verda-Lineo@esperanto.de

Treffen

eine kleine Auswahl, und weiterfüh-
rende links findet ihr auf:
[http://www.esperanto.de/dej/renkont.
htm](http://www.esperanto.de/dej/renkont.htm)